# Neandertala Homo

Neandertala homo aŭ Neandervala homo, science Homo sapiens neanderthalensis. La nomo estis donita de la irlanda anatomisto William King 1863.

Restaĵoj de ĉi tiuj prahomoj estis unue trovitaj en 1856 en la Neander-Valo en Germanio, apud Duseldorfo.

Neandertalaj homoj vivis tra la tuta Eŭropo kaj okcidenta Azio dum la malfrua Plejstoceno, de 150 000 - 35 000 a.K.

La malkovro de tiuj restaĵoj markas la komencon de la paleoantropologio. Ĉirkaŭ 1850, la ideo de homa mortspecio estis preskaŭ nekredebla. Tamen, la verko de Charles Darwin 1859 kaj aliaj fosiliaj malkovraĵoj finfine gvidis al la ideo, ke la restaĵoj estas konektitaj al moderna homa origino. Ekde tiam, pli ol 400 Neandertaluloj estis malkovritaj, tio estas tre surpriza afero, ĉar oni kalkulas ke ne estis pli ol 15 mil el tiuj homoj en tuta historio, tre eble ĝi estis raraĵo kiel nunaj siberiaj tigroj.

Neandertalhomo estis adaptita al malvarmo, kaj tio estas videbla pro lia granda cerbo, lia mallonga sed robusta korpo kaj granda nazo. Tiuj markoj estas ĝenerale selektitaj por malvarmaj klimatoj. Lia cerbo estis preskaŭ 10 elcente pli granda ol tiu de la moderna homo Homo sapiens sapiens. Averaĝe, la alteco de Neandertalhomo estis 1,65 m kaj li estis tre muskola, kiel ĉe modernaj pezlevuloj.

Neandertalaj homoj ofte uzis kavernojn, sed tre probable ili loĝis antaŭ ili en kabanoj, ĉar kavernoj estas malsekaj kaj malvarmaj; kelkaj homoj, ekzemple en nordoriento de Brazilo, ankoraŭ uzas similajn konstruaĵojn.

Ili sciis kiel uzi fajron, ne kiel la Homo habilis, sed tre probable ili sciis ekfajrigi kaj ne dependis de natura fajro. Ili uzis tre kompleksajn ŝtonajn ilojn, faritaj per metodo *Le Vallois*, kaj lignajn lancojn. Ili foje konstruadis ŝirmejon en la subĉielo, foje kun ŝtonoj kaj rokoj. Ekzistas atestoj pri tio, ke Neandertalaj homoj praktikadis iujn formojn de religio, kaj eĉ faradis krudajn formojn de operacioj. Neandertalanoj estis la unuaj homoj, kiuj intence enterigadis siajn mortintojn. Malgraŭ tio, multaj paleoantropologistoj, ĉefe en Usono, neas ke ili povis paroli.

Neandertalaj homoj verŝajne estis nerektaj antaŭuloj de modernaj homoj, hodiaŭ estas eĉ diskutinde ĉu ili apartenas aŭ ne al specio Homo sapiens aŭ ĉu ili estas aparta specio. Tio vere rezultigas multajn - ne proprasence sciencajn - kverelojn.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Neandertala_homo